

Tra Japanio, insulo Hokkaido



Jen la okazo ekkoni tiun parton de la lando kie okazos la UK 2007 kaj precize kie UFE organizas postkongreson.

Birotori (insulo Hokkaido), majo 2004. Mia amiko, gvidanto kaj ĉiĉerono en Hokkaido estis Naoto Miyazawa, el Sapporo. Li prezentis al mi amikindon de li, de la Ainu popolo, la antikvaj loĝantoj de Hokkaido kaj ni pasis en ĝia komunumo proksime de Birotori agrablan tagon kaj nokton, parolante kaj lernante multon pri iliaj tradicioj, historio, estonteco.

Sapporo

Du maldumtagoj mi sole vizitis Sapporo-n, ĉar Naoto havis ion por fari ĝuste dum tiu tempo. Mi trapromenis

la urbocentron, plenplena da floroj (vintre, kiam neĝas, en Sapporo oni organizas konkurson pri glacistatuoj), kaj renkontis multe da afablaj homoj, eble scivolemaj pri tiu eksterlandano (strange, eĉ la japanoj de la aliaj insuloj ne tro vizitas Hokkaido-n, ĉar ili opinias ke ĝi troviĝas tro for...). La urbocentro de Sapporo estas disigita per longa aleo, kie homoj povas promeni trankvile sen timi pri la aŭtomobiloj. Kaj facile oni renkontas ankaŭ tiujn virinojn kiuj zorgas pri infanoj, vojaĝigante ilin per ĉaretoj.

Otaru

En Otaru, mi partoprenis semajnfinan seminarion por komencantaj kaj progresantaj esperantistoj, organizita per Naoto kaj aliaj samideanoj. Ni bone amuziĝis kune kaj la ĉeesto de eksterlandano estis interesa okazo por sperti novaĵojn pri prononcado de la vortoj (japanoj, vi certe scias, kutimas ekzemple interŝanĝi la literojn "L" kaj "R").

Akan Kohan

Kiam Naoto anoncis al mi: "mi havas aŭtomobilon kaj 4 tagojn je via dispono, do, simple diru kien vi volas iri, kaj ni iros", li vere ne sciis en kiuj manoj li estis sin metinta... do, bone, mi diris ke mia unua deziro estis viziti la parkon Akan kaj la lagojn en la centro de la insulo, kaj ni ekis (post aĉetado de iom da bieroj kaj ĉokoladoj!).



En la lago Akan vivas marimo, strangaj algoj kiuj similas al kawaii (ĉarmaj) harbaloj. Ŝajne ili bezonas 200 jarojn por atingi la dimensiojn de basbalo, kaj lastatempe ili havis iom da problemoj kiam oni deklaris ilin Nacia Trezoro kaj homoj komencis ŝteli ilin kiel memoraĵojn...

Ĉe la lago Akan, ni havis eblecon viziti "tradician" vilaĝeton, kie metiistoj ankoraŭ produktas laŭ malnovaj sistemoj (aŭ, almenaŭ, ili ŝajnis tiel).

Ekzistas ankaŭ teatro kaj tie oni povas kelkfoje vidi spektaklon pri legendoj kaj aliaj historioj de la popolo Ainu.

Sunayu onsen

Troveblas, en la sama regiono, ankaŭ lokoj kie homoj (ĉi tie, Naoto)

havas eblecon malsireĝi iomete, metante siajn piedojn en varmakvaj fontetoj. La japanoj, ĉiam organizitaj, jam aldonis



benkon, por sidi pli komforte... ili vere klopodas ĉiam faciligi kaj plikomfortigi la ĉiutagan vivon...

Kasharo

Kiam ni vidis foton de tiu ĉi loko en broŝuro, ni kune decidis ke ĝi estis sufiĉe interesa por ke ni iru tien (kaj ne estis tro for, bonĉance). Temas pri montetoj, kie oni kreskigas plantojn dukolorajn kaj preskaŭ pentras la teron, tiel ke vi preskaŭ ne povas fidi viajn proprajn okulojn kiam vi vidas ĝin, alvenante.

Kushiro

Alia bildo, kiun ni vidis en broŝuro, instigis nin serĉi tiun ĉi lokon. Ni sciis pli malpli kie ĝi troviĝas, rigardis bonan mapon kaj trovis la rivereton. Sed atingi ĝin ne estis tiom facila, ĉar la vojo mem ne estis tiom komforta. Bonŝance, la ĉiaterena aŭtomobilo de



mia amiko taŭgis kaj poste ni promenis la lastan kilometron kaj jen! Jen la spektaklo. Se mi bone memoras, ni eĉ videtis cervon, kiu trankvile manĝis sen zorgi pri ni. Lasta tasko nia estis

trovi la hokkaidajn gruojn (tancho-zuru), tiujn kiuj havas ruĝan makulon sur la kapo. Ili kutime estas ĉi tie dum la vintro, sed kiam la bona sezono alvenas

ili tuj forflugas al Siberio. Tamen, mi deziris fari ĉion eblan por vidi

almenaŭ unu, do ni vizitis multajn lokojn, sekvante indikojn de homoj kiuj tie loĝas... ni malkovris multajn belegajn lokojn, sed neniun gruen...

Finfine, malantaŭ kamparana domo, estis paro da ili, serĉante manĝaĝon por sia ido, kiu dume atendadis en la



nesto. Mi estis feliĉega kaj restis tie observante ilin dum longaj minutdekoj.

Ek de tiu momento, nia bonĉanca stelo reaperis kaj ni vidis kelkajn aliajn, kaj eĉ trovis rezervon kie ili

restas la tutan jaron.

Teksto kaj fotoj de Daniele Binaghi

